


rajdi sur leono estas danĝere




traduki al Esperanto eĉ pli






tradukisto tradukas al sia lingvo

des pli literatura tradukisto



tradukisto tradukas al sia lingvo






tradukisto tradukas al sia lingvo

*tio signifas, ke la tradukanto perfekte
konas tion, kion liaj samlingvanoj scias aŭ
ne scias*


[lia problemo estas nur perfekte kompreni,
kion diras la originalo, ĉar oni tradukas el
fremda lingvo al la propra lingvo]



*sed la tradukanto al Esperanto ne scias,
kiu legos lian tradukon*

*ĉar leganto de teksto en Esperanto povas
esti ie ajn en la mondo, en Japanujo aŭ
en Usono, Peruo aŭ Tajlando*


[lia problemo estas traduki tiel, ke ĉiu
leganto komprenos malgraŭ la malsamaj
kulturaj fonoj]



*sed la tradukanto al Esperanto ne scias,
kiu legos lian tradukon*

*tio postulas pensadon kaj forigon de
specifaj kulturaj konoj necesaj por
kompreni*


[ĉu tio estas ebla?]



la tradukanto al Esperanto ne scias...


*ekzemple mi, kiu legis japanan romanon,
kiam mi eklernis Esperanton, la
pontolingvon de la mondo, kiel oni diras*

ĉu vi scias, kio estas 'torijo'?




la tradukanto al Esperanto ne scias...

Torijo (japane 鳥居 torii—tie, kie troviĝas birdoj—la unua ideogramo signifas «birdo», la dua «troviĝi») estas tradicia japana enirejo antaŭ ŝintoa sanktejo. Ĝi staras antaŭ la sanktejo por disigi la sanktan medion de la malsankta mondo.



la tradukanto al Esperanto ne scias...





la tradukanto al Esperanto ne scias...

Sed en la pinta sceno de mia japana romano en Esperanto, ŝintoa pastro renkontas samurajon/militiston sub la torijo kaj tio estis la fino. Mi ankoraŭ nun ne scias, kion signifas tiu renkontiĝo sub la torijo, kiam pastro kaj militisto renkontiĝas sur la limo inter la materia kaj la spirita mondo.




*ekzemplo el traduko de greka poemo de
Kavafis*

*Honoron al tiuj, kiuj en sia vivo
decidis kaj gardas Termopilon*


...

*Kaj honoron plian ili meritas,
kiam ili antaŭvidas (kaj multaj ja antaŭvidas),
ke Efialto fine aperos,
kaj la persoj finfine trairos.*




ekzemplo el traduko de greka poemo de Kavafis

Ĉiuj europanoj scias, de kiam ili estas junaj, kio okazis ĉe Termolpilo, kaj kiuj estas la kunligitaj ideoj pri la tuta afero.



ekzemplo el la greka - bezonataj klarigoj por neeuropeanoj


Klariga noto: Termopilo [Θερμοπύλαι] estas la nomo de loko en Grekujo, tre mallarĝa spaco inter la monto kaj la maro, kie en la jaro 480-a antaŭ la komuna erao 300 soldatoj el Sparto, estrataj de la reĝo Leonido [Λεωνίδας], haltigis la grandan armeon de la persa reĝo Ĥaŝajarŝao (en la okcidento konata kiel Kserkso). Greka poŝtisto, Efialto [Εφιάλτης], tamen montris al la persoj vojon tra la montoj por ĉirkaŭiri Termopilon. Ĉiuj spartaj soldatoj estis mortigataj. En la okcidento la rakonto pri Termopilo estas konata kiel rakonto de granda heroaĵo. Kavafis utiligas ĝin por glorigi homojn, kiuj agas laŭ justeco kaj homeco malgraŭ ĉiuj malhelpoj



alia ekzemplo


- Provo traduki ‘La nomo de la rozo’ de Umberto Eco, okazanta en la eŭropa Meza Epoko en monaĥejo






alia ekzemplo

- ĉiuj monaĥoj de la sama monaĥejo kunvenis por legi en la latina unu ĉapitron de la Bibilio ĉiutage. *ĉapitro* = *capitulum*. El tio la sama vorto indikis kaj la ĝeneralan kunvenon, la monaĥan assembleon kaj ankaŭ la kunvenejon. Katolikaj esperantistoj




alia ekzemplo

- Kiel klarigi tion al mongola esperantisto?
- en la teksto
- en piednotoj
- uzante ĝeneralajn vortojn kiel ‘kunvenejo’, ‘assembleo’ kaj similajn



Sed jen kion mi ĵus trovis en la reto

- Kapitulo estas la estraro de la Esperanta Civito. Ĝin nomumas la konsulo, atribuante al siaj vickonsuloj specifajn delegojn (internaj aferoj, edukado, kulturaj aferoj, informado, socialaj aferoj, Tria Mondo ktp).
- <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kapitulo>



sed jen kion mi ĵus trovis en la reto